CNT AIT FAI
INTERNACIA LABORIST-ASOCIO
# INFORMA BULTENO
NACIA KONFEDERACIO DE L'LABORO
ADRESO: ESPERANTO-FAKO Av. DURRUTI 30
BARCELONO — HISPANIO
IBERIA ANARKISTA FEDERACIO
II-a jaro 25 JANUARO 1938 Numero 14

# LA NEFORDETRUEBLA FORTO DE C. N. T.

*C. N. T. povas senti sin lojale orgojla pri sia kompakta forto. En la teritorio de la lojala Hispanio neniu alia organizajo estas komparebla al nia glora movado nek laŭ volumeno nek laŭ interna kunrilateco. C. N. T. reprezentas, rilate al la movadoj konsiderataj izolite, la plej fortan levilon, kiun utiligas nia popolanaro por dismovi k premi definitive ĉiun, kiu pro sia rutinemo kontraŭas al la finiĝo de nia historia dramo. Potenco, kiu rezistas mirige dum la plej malfavoraj k severaj situacioj, demonstras plene ĝis kia grado ĝi interpretas k estas pura esprimo de la popolanaraj sentumoj. Neniu movado malproksimigita de ĉi-tiu vivfonto, kiu renovigas ĉiutage la energiojn de la socio, estas kapabla rezisti la agadon de la tempo k de la cirkonstancoj. C. N. T. enigas siajn radikojn en la animon de Hispanio, ĝi estas la esprimo organizata k konscia pri la historiaj necesoj k tendencoj, kiujn la proletaro batalas realigi laŭ maniero plej kompleta k perfekta. Tie rezidas la sekreto de ĝia potenca vivkapablo, kiu supervivis ĉiujn situaciojn, ĉar ĝi krozis Hispanion k frenezajn ofensivojn, kiujn kontraŭ ĝin oni malŝargis. Multaj partioj k registaroj, kiuj kredis facile malkonekti ĝin de ĉia kontakto kun la produktistaj amasoj por poste bati ĝin, formalaperis sen lasi postsignon. Ili reprezentis la akcesoran, la provizoran. C. N. T. reprezentis tendencon de supereco, kiu mortas nur kun la popoloj.*

*Estus interese vidi aliajn partiojn trapasi la fajro-pruvon, al kiu estis submetita C. N. T. por juste precizigi ties vivtaŭgecon. Nia organizo ekde 19a de julio 1936a interne aŭ ekstere de la Povo tenis integraj siajn efektivojn. Ĝies interna kunrilateco koncerne al la problemoj, kiuj estas diskutataj dum la lukto, kiun ni estas aktivantaj, suferis neniom. Ĉiuj problemoj estis solvitaj ĉe ekzempla unuanimeco. Ĝi praktikis la veran demokratiecon internan. La penso de la bazaj organismoj vidis sin ĉiumomente reflektata en Supremaj Komitatoj tra ampleksa praktikado de la federalismo. Tiel ĝia alporto al la milito k al la konstruo de ekonomio de socialismaj linioj estis masiva k proporcia al ĝies grandega forto. Se aliaj movadoj estus sin vidintaj forpelitaj de la profito de la Povo, se ili devus elporti situaciojn kiel tiujn kiujn ni pasigis, estas tre eble, ke la efektoj manifestiĝos laŭ formo de granda malpleno en la kadroj de la kotizantoj.*

*Ne estis de longe, kiam iuj eminentuloj proklamis en Katalunio nenion alian ol la morton de nia granda organizo. Sed la kuraĝuloj, kiuj anticipis disvastigi al la kvar ventoj la novajon pri nia malfunkcio, suferis la plej teruran dementon: tiun de la faktoj. Kiam al C. N. T. oni permesis manifesti sin kune kun la ceteraj antifaŝistaj tendencoj, ĝi faris ĝin kun tia fortikeco, ĝia ĉeesto elstariĝis en proporcioj tiom grandegaj, ke ĝies kalumniantoj restis subigitaj al plej profunda ridindo. Oni faris ĉion por ke la prognozaj aŭguristoj havu konfirmon. Aliaj estus pereintaj de la dura pruvo. La senco pri respondeco de C. N. T., metante en unua vico tion kion ĝies alegraj kontraŭstarantoj forgesis: la gajno de la milito, akceptante la plej rigoran k efektivan disciplinon en evito de pli grandaj malbonajoj, estis interpretata kiel simptomo de malforteco. K kompreneble, la malforteco de organizita movado estas la antaŭsalono de la morto. Kunmiksante bedaŭrinde la prudenton kun la manko de forto, ili ebligis atingon al la notitaj pilgrimoj.*

*Organizo kiel la nia estas la plej bona garantio pri la venko en la nunaj momentoj. Ĝia radiko estas samesenca al la vivo de la popolanaro: la grandaj amasoj kiuj movigas la produktadon, ĝies ĉiama linio revolucia, kiuj metas ĝin en la plano de la fortoj absolute sekuraj k dignaj la plej grandan konfidon, la senco pri respondeco, kiun demonstras, plifaciligante la korecan interkompreniĝon de la antifaŝismo k proponante kunajn solvojn, kiuj finiĝu kun la manko de konverĝo antaŭ la problemo de la milito k la rekonstruo de nia lando, estas tialoj pli ol sufiĉaj por transformi la politikon sekvatan.*

*De C. N. T. oni ne povas k ne devas apartiĝi eĉ unu momenton. Tia ago signifas meti eksteren de la direktata linio la plej grandan el la ordigaj potencoj, pri kiu disponas Hispanio nuntage. Ni estas farantaj socian militon. Kiam oni proklamis, ke en la Parlamento kunagis inkluzive reprezentantoj de la dekstraj partioj, ne havas akcepteblan eksplikon tiu formeto de la aŭtentaj fortoj de la popolo. Kion ni bezonas estas rekonstrui la antifaŝistan blokon surbaze de la fortoj, kiuj batalis la 19an de julio 1936a: Ĉia plilongiĝo al la sektoroj de la dekstrularo, dum ampleksaj proletaj zonoj restas ekstere de la ebleco decidi, estas nete pereiga.*

## ANTONOV OVSEENKO

*Post la eksigo el la posteno ĝenerala konsulo de U. R. S. S. en Barcelono k lia elekto por popolkomisaro pri la justo en U. R. S. S. anstataŭita per Krylenko, post sia lasta funkcio, mi skribis en "Revolution Proletarienne" de 25a de Septembro: "Nu bone, Antonov Ovseenko revenos. Ni ja sciis kio lin atendas. Nin ankaŭ. Lia formalapero ne estas pli ol demando de tempo. Mi pensis, ke pro bonkonveneco, lia formalapero prokrastiĝos certan tempon, kelkajn monatojn. Mi trompis min. La nova popolkomisaro pri la Justo en U. R. S. S. ---kia ironio!--- ne surprenis sian funkciadon. Li formalaperis. Li ascendis en Sovetan ŝipon en Barcelono k estis retenita tuj post sia alveno al U. R. S. S. Nekonata funkciulo, nomata Dimitrief, ricevis la postenon pri la Justo."*

*Victor* **SERGE**

**NIAJ PRINCIPOJ**

# LA ETIKA PACIFISMO

En "De Vrije Arbeider" (La Libera Laboristo) semajna organo de F. A. N. (Federacio de Anarkistoj en Nederlando) aperis jam pluraj artikoloj sub la titolo: "Niaj Principoj". Tiel ankaŭ en la numero de 18a de decembro 1937, en kiu la estraro de F. A. N. publikigis la artikolon "La Etika Pacifismo". Ĉi artikolo mi trovis sufiĉe tradukinda esperantlingven, ĉar ĝi ĵetas klaran lumon sur tiun movadon nomatan en Nederlando "La Etika Pacifismo". Mi trovas ĝin publikiginda per "Informa Bulteno", por ke la diverslandaj k-doj ricevu ankaŭ el Nederlando impreson ne nur pri F. A. N., sed ankaŭ pri la etikanaro. — La tradukinto.

Movado ne malgrava estas en Nederlando la etika pacifismo. Ĝi estiĝis ne el la laboristara movado, al kiu dum sia batalo kontraŭ la burĝaro mankis la tempo fari sentimentalajn cerbumojn, sed el la influo de la pastoroj k la ekspastoroj, kiuj svarmas en k nutras tiun ĉi movadon. Iliaj zorgoj kuŝas sur religia k etika tereno. Mortigi homon ili trovas fakton eĉ tiom terura, tial ke ĉio alia estu ignorata. Ilia amata ĉevaleto k ilia manio estas ĉi jena ĉiam ripetata aksiomo: la milito, jes ĉia armilperforto, ankaŭ dum la revolucio, estas nehoma, ĉar tio kaŭzas la morton al homoj. Estas etikanoj el la plej diversaj tendencoj. La kongreson de la W. R. I. de Kopenhagon vizitis Lordo Ponsonbi, George Lansburi, pastoro Karter (kiu honoris Lansburi'n, ĉar li estis vizitinta Hitler'on k Mussolini'n, k la reĝon de Belgio, ĉar li volas ekonomian kunlaboron internacian) k tie estis kompreneble ankaŭ k-do De Ligt, kiu la perarmilan revolucion malaprobis k aludis, kvazaŭ niaj hispanaj k-doj vidas sian revolucion endanĝeriĝanta... ĉar ili ankaŭ perforte batalas. Facile oni povas prezenti, kian "revolucion" Katalunio havus, se niaj k-doj ne perarmile estus batalintaj kontraŭ Franko!

En tiu-ĉi tiom diversa societo estus estintaj en sia ĝusta loko ĉiuj nederlandaj pacifistoj, kiuj tiel timas la revolucion kiel la militon, k tial ĉian aplikadon de perforto por kia ajn celo malakceptas. Kial? Ĉar ili al si ne povas prezenti la pozicion de la laboristoj k la senlaborulo. Sed ne deiru de la etiknepermesebleco de la perforto.

Kial estas la ago senigi iun je la vivo malpermesita? Ja ne, ĉar iu leĝo Dia ĉu iu ordono de Moseo —kiu ĝin cetere mem malmulte atentis!— ekzistus. La nura esenco de tio povas signifi, ke oni ne permesu al si kaŭzi personan suferon al alia. Sed ni vivas en socio divigita en klasojn, kie unu grupo ne alion faras, ol per persona suferado enabismigi la alian. Oni legu k sciu, kiel vivas la senlaborulo! Li povas kredeble al si ankoraŭ elporti la mizeron kaŭzitan pro malabundeco de nutraĵoj k pro foruzitaj ŝuoj k vestaĵoj. Sed vivante en familio li pleje suferadas pro la mizero de edzino k infanoj. Tiu neelportebla mizero ĉiutaga, tiu subfosanta, elĉerpanta, la spiriton paralizanta zorgo, tiu senperspektiva malbonstato, tiun ne povas kompreni pastoroj k homoj kiel Lansburi. Ili parolas pri etiko, tamen plej malmorala estas ne nur la milito, sed la nemezurebla ekspluatado k mizero al laboristoj, edzinoj k infanoj. Estas laboristoj perlaborantaj dekduon da guldenoj posemajne, senlaboruloj ricevantaj ankoraŭ malpli da mono. Nia etikanaro al si prezentu, kiom da sufero tiuj ĉi homoj devas sperti dum pactempo, en sia mizero, sia ekzisto de paŭperuloj. Estas restoracioj k kafejoj, estas kinematografejoj k teatroj, magazenoj plenaj de vestaĵoj k porvivaĵoj, festoj k baloj —k ĉi ĉio estas ne por tiu ci granda paŭperiĝinta amaso. Ĉu ĝi povas ion alian fari, ol provi militi kontraŭ tiu ĉi socio? K kiam ĝi tion ne faras, tiam ĝi degeneras en malamikeco, ne nur kontraŭ la socio, sed ankaŭ kontraŭ la kulturo en kiu ĝi ne partoprenas. Ekzistas do du eblecoj: ĉu batalo ĝismorte, aŭ malamikeco kontraŭ la civilizacio, kiu la vastan amason esceptas.

Ni esploru la unuan kazon. Ĉu oni opinias efektive, kiam la incitita k ofendita amaso havas la ŝancon liberigi sin, ĉu almenaŭ provi tion ĉi, ke ĝi ne riskos la uzadon de perforto, kiam tio estas necesa? Kompreneble la grado de tiu perforto, dependos de la forto de la antagonisto. Sed la laboristoj spertantaj la mizeron —oni vidu Hispanion— ĉu malriĉaj terkulturistoj ne povas akcepti elbuŝe de moraligantoj la deziron sin deteni de batalo (kia ajn), kiam ilia ekzistado iĝis neelportebla. La morto ne timegigas ilin. *Pli terura estas al ili la vivo.* K ĉu sin deteni de batalo kontraŭ la kontraŭrevolucio k la faŝismo, ĉar oni alie... devas mortigi homojn? Sed tiuj kontraŭuloj reprezentas la tiranecon k la mizeron, la sistemon kiu pereigas. Ĉu la vivo de tiuj ĉi plivaloras ol tiu de la popolamaso? Tiel la amaso sentas tion, k kiam ne ekzistas alia ebleco, tiam ĝi akceptas ankaŭ la perfortan batalon, ĉar ĉio estas pli bona ol daŭre travivi staton, kiu frenezigas. Ni propagandas nenion, ni konstatas, ni komprenas k... defendas, ĉar sendube "kulpas" ne la proletoj agantaj kiel en Hispanio. K nun la duan kazon.

Malamikeco kontraŭ la kulturo, rezignacio, senkuraĝeco malespero. En libreto pri la urbo Enschede diras Dro Van Heek la jenon: "gefraŭloj junaj, severe religiaj, *sep jarojn* fianĉiĝitaj. De tempo al tempo ili perlaboras, sed estas plejofte senlaboraj. La pastro proponas al la gejunuloj rompi sian fianĉecon, ĉar ja ne eblos edziĝo, ilia fianceco finfine kaŭzos "pekon". Mallonge da tempo post tiu ĉi propono estis farita, devis la viro kiel ankaŭ la virino sin meti sub la povo de psikiatro..."

Unu kazo el miloj. Seksa nekontenteco, kapricoj de freneziĝo, senfortiĝo. Ĉu vi jam sondis la suferon de tiuj ĉi "senperforte" vivantaj homoj? Certe, la soldatoj spertas multe da sufero. Kiu ekmarŝas, kuŝas en tranĉeo, estas vundita, suferas terure. Sed tiu soldato liberigas sin dum aktiveco ofte de zorgoj, de la putra socio, de la hipokrita moralo. Li ankoraŭ agas nur pro unu afero: li militas por sia vivo, travivas la premiĝon de la pasioj. Li havas sian suferon. Jes, *sed la persona sufero de la soldato estas multokaze pli malgranda ol tiu de la senlaborulo k la malriĉulo*, kiu vidas sian familion ruiniĝanta. K tiam okazas, kion nia etikanaro tiom timegas: malfeliĉulo tia preferas plivolonte la militon ol tiu ĉi pacon, k rekrutite li ekmarŝas, ĉar ĉio estas pli bona ol tiu teruro hejme. Malespero, senkuraĝeco k rezignacio igas lin akcepti la militon...

Ni konstatas, ni vidas, kio estas terura k fatala. Sed la kaŭzo kuŝas en la kapitalismo dum pactempo, kiam ĝi preparas la militon. Certe: ankaŭ ni preferas sensangan forrenverson. Sed temas ne nur pri kio ni volonte volas. La temo estas, elekti, esti partio ĉe kio okazas, k tiam ni estas solidaraj kun laboristoj kiuj —eĉ per aplikado de perforto— por sia sociala liberiĝo batalas kiel de 1936 en Hispanio —sed ne kun kiuj militas por ŝtato k kapitalismo. La "etika" problemo estas *socia problemo*. La homo estas bona tiom, kiom la sociaj interrilatoj tion al li permesas. K la renverso al tiuj interrilatoj estas unua devo k neceso— ne la predikado k moraligado pri la malboneco de la homoj, kiuj inter si amare malmulte diferencas, kvankam ekzistas do vantaj moraligantoj opiniantaj sin povi bati sur la brusto pro siaj imagataj virtoj. Kion ni devas voli honori, en F. A. N., ne etikfilozofia sekto, sed laboristara movado batalanta. De el tiu starpunkto ni devas difini nian sintenon rilate la perforton.

Esperantigis

G. VAN'T VEER

# Han Ryner, konscienco de la tempo, mortis

## LIA FILOZOFA PENSO ESTIS EN VIVA KONTAKTO KUN LA PREMITAJ KLASOJ

En la filozofa tramo de la moderna mondo, Han Ryner estis selekta spirito. Direkta heredinto de la helena penso, li unigis al ĝi la delikatan ekvilibron de la Franca Renesanco. Inter la amaso da intelektuloj de sia naskiĝlando, malsame je Anatol Frans (Anatole France) aŭ Romen Rolan (Romain Rolland) li okupis, malgraŭ sia brilega soleco, sia silenta laboro, tre altan rangon je la nivelo de la malaperinta aŭ la varmega k frateca batalinto de "Johano Kristofo". Tute same kiel li, Ryner, reprezentulo de la pensema k liberspirita Francio, posedis tre amasan riĉon en la originala fortikeco de sia ideo, la beleco de lia filozofa koncepto, la senfina fluado de liaj imagoj k liaj vortoj. Princo de la francaj rakontistoj, tiel li estis nomita. La unua inter la batalantoj de la Justeco, diras ni proletoj. Kun la granda Severin, kun Rolan, kun Frans, kun ĉio digna k mirinda de la franca penso, Han Ryner, mortinta la 8an de januaro 1937 je 77 aĝo, havis la certecon pri mirinda maljuneco, en miloj da bataloj partopreninta, sur la tribuno, en lia penso k agado favore al la prematoj k persekutatoj el la tuta Terglobo. Estas neplenigebla manko ĉe la vicoj de la Liberrec-batalantoj. Individualista anarkisto, lia humaneco plena de ekvilibro, penso k beleco, estis en viva kontakto kun la proletaj klasoj, kiel rekta k singulara konscienco, kiel li estis niatempe.

# PROMENEJO

N .N. prittraktas en "Heroldo de Esperanto" (n-ro 48) "Esperanto k la modernaj aŭtostratoj", kiujn oni faras en Germanio de 1933. Ĝies avantaĝo (por la registaro) simple frenezigas lin k pro tio li deduktas:

"Tio klare montras, ke iom post iom ĉiuj stratoj estos provizitaj per aŭtostratoj. Tiam en ĉiuj landoj komenciĝos la vojaĝado per malkaraj aŭtobusoj. Unuvorte, la aŭtobuso fariĝos la malproksimtrafika rimedo de la popolo, la aŭtobuso donos al ni la eblecon fari vizitojn, ne nur al niaj propraj urboj, regiono ktp. sed eĉ al la nin ĉirkaŭantaj landoj, k -tiam venkos Esperanto, ĉar tiam oni ĝin bezonos."

"Tio klare montras, ke iom post iom ĉiuj stratoj estos provizitaj per aŭtostratoj", por ke la spionoj-hundaĉoj povu kiel eble plej rapide penetri ĉien. K "tiam en ĉiuj landoj komenciĝos la vojaĝado per malkaraj aŭtobusoj", t.e. senpagaj, kiel komenciĝis en 1933 en Germanio por la germaniaj proletoj, ĉar "unuvorte la aŭtobuso fariĝos la malproksimtrafika rimedo de la popoloj, la aŭtobuso donos al ni eblecon fari vizitojn" ne nur al niaj propraj urbaj k regionaj karceroj k kazematoj, ktp., sed eĉ al la nin ĉirkaŭantaj tombaroj, "k -tiam venkos Esperanto", kiel venkis jam en Hitlerio, "ĉar tiam oni ĝin bezonos".

* * *

Maur. Jaumotte en la novjara n-ro de "Belga Esperantisto", rimarkigante, ke dum la Mondturmento okaze de la Kristnaskiĝo oni haltigis la pafadon, plendas:

"Sed en la nuna buĉado, inter fratoj de sama lando de Hispanujo, inter homoj de sama raso en la malproksim-Oriento, ni ne aŭdis pri tiu unutaga haltado... kontraŭe, la pafado k la bombjetado daŭradis, se eble, eĉ pli akre."

Ni "ne aŭdis pri tiu unutaga haltado", sed ni aŭdis k plu aŭdadas pri tiu plurtaga neŭtrala Ne-interveno, t.e. pri interveno neŭtralismo. K pro tio "kontraŭe, la pafado k la bombjetado daŭradis, se eble, eĉ pli akre."

K li daŭrigas:

"Ni, esperantistoj, nenion kapablas entrepreni kontraŭ tiaj agoj. Sed ni tamen povas, en nia mezo, zorgi, k la Pacspirito ne tute droniĝu en la indiferenteco de la amaso k la militemo de kelkaj nacigvidantoj."

Ni opinias, ke, se "ni tamen povas, en nia mezo, zorgi, ke la Pacspirito ne tute droniĝu en la indiferenteco de la amaso k la militemo de kelkaj nacigvidantoj", ni, esperantistoj multon kapablas entrepreni kontraŭ tiaj agoj.

# Internacia Angulo

**El Palestinio.** — Samkiel la laboristo, se ne pli, la judo estas la ĉasbesto de la posedanta klaso k ne nur de tiu... Tute fresbakita malamiko disvolviĝis: la arabo, ĝenerale, k ties lakajo, la felaho, la arabo, kiu neniom posedas, k tamen ne rekonas, la solidarecon de la parioj; la felaho, kiu mem estas senrajtigata de siaj arabaj feŭduloj; tiuj senmaskaj ŝtelistoj ne ĉesas prediki al siaj sklavo, ke la "araba patrio", Palestino, estas en danĝero. Por bagatelajoj la sklavoj obeas k ĉiutage judoj, laboruloj viktimiĝas en la stratoj dum la laboro, dum la konstruo de ŝoseoj k domoj, dum la plugado...

La kugloj, kiujn oni eligas el la korpoj de la viktimoj, estas germana, itala k -angla fabrikajo. Lasttempe ankaŭ soldatoj iĝis viktimoj de la araba faŝismo. Do oni fine devas reagi, k la britoj funkciigis militistan tribunalon, kiu jam malestigis unu arabon, "ŝejhon", riĉan, kiu de post longa tempo gvidadis armitan bandon en la montaroj de la "sankta lando".

Estas elkovrite de kie venas la financoj; k ne nur el Italio. La germanaj kolonioj en ĉi lando estas same interesataj labori por sia "Tria Regno".

La arabaj antijudoj murdas la judojn pli ol en la aliaj landoj. En Palestinio vivas 400.000 judoj k 850.000 araboj. Ĉi lastaj enmigris en la landon de Israelo antaŭ 1.300 jaroj, igis ĝin sankta, kopiante la judojn, kion ankaŭ la kristanoj faris per la diigo de la proleto Jesuo.

Multajn judojn oni renkontas, kiuj estas la rifuĝintoj el la Hispanio de Torquemada (Torkemada) (1) k momente enmigras la rifuĝantoj de Torquemada N-ro II: Francisko von Franko.

Proporcie multaj judaj laboristoj forveturis al Hispanio por helpi la popolon kontraŭ la internaciaj banditoj, kiuj iom post iom estas rekonataj flanke de la demokratio. La hebreaj organoj, eĉ tiuj de la socialdemokratoj, "Davar", ne volas mencii la nomojn de la herooj, kiuj verŝis la sangon ne nur por la hispana, sed ankaŭ por ĉiuj honestaj popoloj.

La amikoj de C. N. T.-F. A. I. en Hajfa organizis ekde la komenco de la hispania milito ekspozicion pri Hispanio, kiu migradas de urbo al urbo, de "kibuc" (kooperativo kolektivula) al "kibuc", tra la tuta lando.

La milito inter la britoj k la arabaj interoristoj akriĝas pli k pli. Jus mi sciĝas pri batalo, kie 11 araboj estis dispafitaj k 12 kaptitaj kun la armiloj (germanaj) en la mano. Tiuj "idealistoj" ĵetas bombojn, kontraŭ infanojn ne malpli. Palestinio travivas la trian "hurba"-on, laŭ la kristana kalendaro, la ruiniĝon ne nur de la temploj, sed de la popolo, kio estas la tuta kontraŭo.

**Ch. Armoni (Haifa)**

# Parolas Kataluna Naciisto

La Komisarejo de Propagando de la Generalitato publikigas informajn bultenojn en kataluna, kastilja, franca, angla, germana k esperanta lingvoj por doni al la monda gazetaro elementojn, kiuj favoru al la popolanaro hispana k kataluna en ĝies luktado kontraŭ la faŝismo. Ĉi tiuj bultenoj estas redakataj tiel, ke povas doni al la eksterlando sensacion pri antifaŝista unueco reala. Pro tio estas absolute esceptataj ĉiuj tiuj komentoj, kiuj pro sia partieco difektas tiun sensacion.

La monda gazetaro fariĝis lasttempe eho de fakto kiu estis ekspluatita kontraŭ ni de la internacia reakcio, la pretendataj konversacioj en Biarritz inter reprezentantoj de Katalunio k specialaj delegitoj de Franko cele diskuti la kondiĉojn pri interpakto.

La sensacia komuniko estis vastege diskonigita de la grandinforma gazetaro k kontribuis krei kontraŭ Katalunio medion de suspekto k nekonfido.

Necesis organizi rapide la kontraŭ-atakon. La Komisararo de Propagando skribis malfermajn leterojn, kiuj estis publikigitaj en "News Chronicle", "Manchester Guardian" " "Daily Telegraph". Nia amiko Tomás inteligentega reprezentanto de agentejo Havas en Barcelono donis noton publikigita de la tutmonda gazetaro, en kiu oni montris, ke la famaĉa "interkonsento de Biarritz" ne estis pli ol konversacio inter elementoj de la Ruĝa Kruco por plifaciligi interŝanĝon de militkaptitoj.

Antaŭhieraŭ venis en mia skriboĉambro la anglalingva bulteno destinita esti ekspedita al ĉiuj landoj, kie estas parolata angla lingvo (Britaj Insuloj, Kolonioj k Usono).

La redaktoro de ĉi tiu bulteno, fariĝante eho de determinitaj kampanjoj, parolas pri la jam forgesitaj konversacioj de Biarritz, k certigis, ke je la nomo de Katalunio tri elementoj de P.O.U.M. traktis kun Franko la kondiĉojn pri kapitulacio.

La noto malplaĉa, ĉar krom ke estas absolute falsa, kontribuis —donita de oficiala organismo— meti ankoraŭfoje je publika diskuto la famaĉajn konversaciojn de Biarritz.

La aperigo de la bulteno estis malpermesita k oni procedis al la eldono de nova, kie ne figuris la menciita informo.

La elementoj apartenantaj al P. S. U. C. kiuj laboras en la Komisarejo de Propagando (el kiu kvankam la insidaj kampanjoj de ĉi tiu organizo, ne estis forpelitaj) rapidis transdoni la cenzuritan noton al "Treball". La gazeto del P. S. U. C. reproduktis ĝin per nigraj literoj citante —por unua fojo— ĝies devenon k atribuante al ni ĝies disvastigon.

Nin interesas klarigi unike, ke la Komisararo pritraktis ĉi tiujn demandojn laŭ maniero absolute korekta, kio unu fojon pli ne estis respondita de la redaktoroj de la socialista gazeto.

*Jaime Miravitlles*

# LA PROPAGAND-METEDOJ DE LA KOMUNISTOJ

Kiam oni fortranĉis la komunikilojn al Teruel kun la cetero de la faŝista Hispanio, sieĝis la urbon k eniris kelkajn kvartalojn de Teruel, oni publikigis la noton, ke Teruel falis. Nature por la faŝistoj jam estas falinta Teruel, sed tio ne volas diri, ke jam troviĝas restarigita la normala vivo de la nomita ĉefa urbo, ĉar ankoraŭ restis multaj faŝistaj centroj k ili estis defendantaj sin en la plej fortikaj konstruaĵoj k en la naturaj fortifikaĵoj de la nomita urbo. La lojalaj trupoj luktadis kontraŭ la faŝistoj rifuĝintaj en ĉi tiuj kontsruaĵoj. La civilanaro, evakuis el la urbo por ne suferi la domaĝojn de la milito. Mankis multe por la normaliĝo de la vivo en la urbo.

La komunistoj, kiuj ĝis tiam rompis ĉiujn propagandajn rekordojn, ekrapidis fari propagandon en Teruel. Kiam en Teruel ankoraŭ estas audiĝantaj la eksplodoj, kiam oni ankoraŭ ne estas prenintaj iun presejon k ne ekzistis eblecon eldoni ian gazeton, la komunistoj jam eldonis tian titolatan "La Verdad" ("La Vero").

Tuta Hispanio restis surprizita de la kapablo de la komunista partio en pripropagandaj demandoj, kapablo, kiu ĝis tiam ĝi ne montris en ia alia tereno. Tio estis interpretita de la tuta mondo, ke la komunista partio deziregas serĉi adeptojn inter la civilanaro de la urbo jus konkerita. Eĉ en la gazetaro aperis diskutoj neante al ili ĉi tiun rajton, rimarkigante, ke ne estas la komunistoj la unikaj, kiuj devas direkti sin al la civilanaro, sed ĉiuj politikaj k sociaj movadoj.

Post ĉi tiuj diskutoj en la gazeto, evidentiĝis, ke la gazeto "La Verdad", kiun la komunistoj diris, ke eldonis en Teruel, efektive ne estis eldonita en la nomita urbo, sed en Valencio, de kie oni ekspedis ĝin al tuta Hispanio, vidigante ke estas eldonata en Teruel.

La Hispania proletaro vidis ankoraŭfoje pli la ridindecon de la komunistaj metodoj.



Sklavigitaj de la fashismo, kiu ilin traktas per la vipilo de la tiranio, ekzistas miloj da laboristoj en la fabrikoj, uzinoj k minejoj laboras subigitaj.

# KIEL DISVOLVIĜAS EN KASTILIO LA KOLEKTIVAJ GRUPOJ

Kiam la duono el Kastilio ne estas kulturata, rezultas kuraĝiga la ekzameno de la rezultoj obtenitaj kun la nova sistemo en iuj vilaĝoj de Kastilio. La kazo de Miralkampo, ekz. povas servi al la leganto kiel kurioza fundamento por prijuĝi la titanan forton de niaj plugistoj gvidataj de la elementoj, kiujn disponigas al ili nia organizo C. N. T.

En la jaro 1936a, sub la kapitalista sistemo, la produktado en la farmejo, pri kiu ni parolas, estis la sekvanta:

| | |
|---|---|
| Greno ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 192.000 kgr. |
| Fojno (importo de la kolekto) ... | 80.000 ptoj. |
| Hordeo ... ... ... ... ... ... ... ... | 32.000 kgr. |
| Melonoj (importo de la kolekto) | 196.000 ptoj. |
| Vino ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 36.000 ltr. |

La produktado de la sama farmejo kolektive dum la 1937a jaro:

| | |
|---|---|
| Greno ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 448.000 kgr. |
| Fojno (valoro por la unua rikolto) | 40.000 ptoj. |
| Melonoj (importo de la kolekto) ... | 300.000 ptoj. |
| Hordeo ... ... ... ... ... ... ... ... ... | 128.000 kgr. |

La totala importo de la fojno kalkuliĝas en 250.000 p-toj.

Kiel vidiĝas, la ciferoj, kiuj signas ĉiujn produktojn, plialtiĝis almenaŭ 100 procente k kelkaj 200 k ĝis 400 procente. K tio dum plena milito sen maksimuma perfektiĝo de la terkultura tekniko, sen ŝveligitaj kvinjaraj planoj k sen alia influanta faktoro ol la entuziasmo de grupeto da laboristoj bonvolemaj, kiuj laborante por si k siaj familioj, kontribuas al la plialtigo de la agrara ekonomio. Ĉu ne estas aplaŭdinda k konsiderinda la realigita klopodo?

Estas en la farmejo, kiun ni komentas, bonega kunikloj-bredejo; krome ĝi posedas pli ol cento da porkoj, grandan kvanton da kortaj birdoj k provizumejo por 800 personoj sen distingo de la Sindikat-organizo, ĉar tie oni vivas en plej sincera k ĉarma kamaradeco.

Ni substrekas la kazon de Miralkampo, ĉar la farmejo apartenis al la eks-grafo Romanones k la publika opinio scias kian atenton li elmontris, pro sia inklino al la agrikulturo k al la teroj, kiujn li posedis. Sed la laboristoj, intime unuigitaj pruvis sian superecon.

Kazoj kiel tiu de Miralkampo estas citeblaj multaj en Kastilio. Tiu de Tielmes, Dos Barrios, Cabaças de Yepes, Coslada, Tomelloso, Almagro k tiom da aliaj, kies citado formos senfinon.

---

*La redakcio de "Inf Bul." decidis eldoni serion da libroj super la revolucio k la milito. La unua numero aperos ne postlonge k enhavos ĉirkaŭ 100 paĝojn. Ĉi libron rajtos ricevi senpage ĉiu nia leganto, kiu ĝis ĝies apero mondonancis al "I. B.". La ceteraj legantoj akiros ĝin kontraŭ pago. Krome, la neabundo de papero devigos nin eldoni limigitan kvanton. Tial ni atentigas al la kamaradoj kiel eble plej baldaŭ fari mendon. Pro la ofta vario en la prezo de la papero la prezo de la libro estos fiksota iom pli poste.*

# GRAJNAĴOJ

## OROŜTATO: LA MORGAN-FIRMO

Jay Franklin en la Ruzvela gazeto "Post" montras kelkajn faktojn pri la potenco de Morgan-firmo. Societoj de telefonoj k de telegrafoj de elektroproduktado k de militindustrio estas gvidataj de la familio Morgan. Dum 1929, pere de Bankoj k de Korporacioj, ĝi kontrolis sesdekprocente la riĉojn de la Usona lando. En 1932 etendiĝis ĝia superrego ĝis valoro de 77600 milionoj da dolaroj, k en la daŭro de ĉi lastaj 5 jaroj tiu potenco financa pliiĝis konsiderinde.

Tiuj faktoj estas tre sugestaj por juĝi la sukcesojn de la politiko de Ruzvel, kiu dank al "New Deal"-ilo, proponis elimini la trustojn en Usono k kontraŭstari la superinfluon de la financa kapitalo.

Se oni analizus en ĉiu lando la distribuadon de la riĉo, oni rimarkus similan fenomenon rilate tiun jus spertitan en Usono. La "Comites des Forges" en Francio, kelkaj lordoj en Anglio, k c. monopolas grandan parton el la nacia riĉo. La laborista klaso troviĝas en veraj reĝlandoj —la oraj reĝlandoj— k en la kapitalistaj diktaturoj kun plena demokrata reĝimo. Pro la senhalta disvolviĝo de la kapitalismo akcentiĝas tiu procezo de financa koncentriĝo, k la rezulto estas, ke en kelkaj lokoj la demokrataj institucioj krevas k eblas la stariĝo de diktaturoj, k en la aliaj la reprezenta reĝimo fariĝas nur fikcio.

La proletaro devas kompreni, ke en la tereno de la politiko neeblas lukti kontraŭ la kapitalo-diktaturo. La reformoj, kiuj temas nur ekskluzive pri la superstrukturo politika de la burĝa sistemo, estas senfruktaj. La granda nuntempa problemo estas la milito kontraŭ la bankiera feŭdalismo, k tiu ĉi batalo estas elstare sociekonomia. Unuvorte: revolucia!

## LA FIASKO DE LA PACIFISMO

La memeksiĝo de Italio el Ĝenevo kaŭzis malkuraĝigon al la t. n. "pacifistoj". Ili bedaŭras, ke la fiasko de la Ĝeneva sistema kunportos kiel sekvon la neeblon eviti la militon.

"La pacifistoj" eraras. Ne estas la fiasko de la Ligo de la Nacioj la kaŭzo de la milito, sed estas ja la milito tiu kiu furiozas en diversaj regionoj de la Terglobo k speciale tiu kiu embrias en la kerno de ĉiuj registaroj -la kaŭzo de la fiasko de Ĝeneva sistemo. La tragedio de la burĝa pacifismo estis ĉiam la eluzio eviti la militon per kelkaj moralaj normoj aŭ kelkaj leĝaj paragrafoj, ne tuŝante la sistemon pri armeo k armiloj.

La proletaro liveris al la aktuala vivo novan koncepton pri pacifismo, tio estas la koncepto "antimilitista". Tamen la milito de 1914-18 demonstris, ke tiu ĉi koncepto estis ankaŭ nekompleta k devus konduki al fiasko. Oni diris, ke la laborista klaso bezonus per "totala striko" al militodeklaro, sed kiam alvenis tiu momento, oni konstatis, ke la militista ŝtato estis tre forta por ĝin kontraŭstari per la totala striko. Ankaŭ la proletaro estis en eraro dezirante forigi la efektojn sen konsidero pri la kaŭzoj. Tiam oni komprenis, ke la proletaro ne devus esperi la fatalan horon de la interpopola murdado por almiliti la militon, sed male, en iu ajn momento, senĉese, ĝi devus rifuzi la militelspezojn k nei ĝian konkurson al la fabrikado de mortigiloj k militmaterialo.

Tamen ankaŭ tion oni ne faris. La proletaro estas influegata de la politikaj partioj, kiuj estante registaraj, ne povas esti sinceraj antimilitistoj, ĉar ja la ŝtato estas organizo reliefe militama. K aliafoje la popoloj konscios pri sia kulpo en la momento de la milito-deklaro, t. e. tro malfrue.

Ĉu tiom da murdoj k angoroj bezonas la laborista klaso por lerni plenumi sian devon?

*Kompilis:* OSBANTO

**HEM DAY**

# La Internacia Kapitalismo antaû la Revolucia Hispanio

I

La situacio de la Revolucia Hispanio ne ĉesis malkvietigi la internacian kapitalismon, kies egaj interesoj absorbe estas minacataj de la transformado, kiu, adaĝe sendube k tra amaso da malfaciloj, disvolviĝas en la hispana ekonomio.

Estas interese ekzameni la gravecon de tiu kapitalismo k la rolon, kiun ĝi ludas en la pridirata ekonomio cele registri rezultojn ĉu pere de la registaroj, kiujn ĝi reprezentas, ĉu pere de la konduto de la Ligo de lâ Nacioj k eĉ pere de la pergazetaj kampanjoj, kiajn ĝi senĉese subvencias.

Tiele al oni estos eble vidi klare la fonton de la fenomenoj, kiuj estas okazantaj poste de Julio 1936 k kiuj venigis nin al la prezenca situacio.

**MARCH K KAMBO**

Ekde la komenciĝo de la ribelo oni parolis multege pri iu bankiero suspektinda, laŭsajne, kiu proporciis la subvenciojn por la ribelo. March ja estis doninta motivojn por ke oni parolu pri li sufiĉe antaŭe la okazintaĵoj de Julio, k la ministro pri la Financoj de la Hispana Respubliko, Jaime Carner denunĉis lin trafe antaŭ la parlamentanoj kiel stranga pirato.

Jen kion diris pri tiu kondotiero la citata ministro: "March estas eksterordinara kazo; li ne estas amiko nek malamiko al la Respubliko, kiel ne estis amiko nek malamiko al la diktaturo de Primo de Rivera al la monarkio de Alfonso. March ne estas amiko nek malamiko al iu ajn. Por juĝi pri lia intelekto k liaj konceptoj necesas reprodukti al si ulojn samvalorajn: li estas individuo de la Mezepoko kun la rimedoj de la 20 centjaro. March estas simila al tiuj homoj, kiuj krozadis la Mediteraneon antaŭ centjaroj k kiuj ne havis aliajn malamikojn ol tiujn kiuj intencis bari al li la vojon. Li marŝas sur sia vojo kun ununura leĝo: sia volo. Kiuj estis antaŭnelonge liaj malamikoj? La Monopola Tabak-kompanio, Kambo, Berganini, Bastos, t. e. la ministroj k la publikaj organismoj, kiuj metis obstaklojn antaŭ la realigo de lia volo. Hodiaŭ liaj malamikoj nomiĝas Galarza, Prieto, Azaña, mi mem; morgaŭ estos iu ajn el vi. Tiu kiu baras al li la vojon estas lia malamiko. Tia estas la homo, kiun, mi petas, estu forpelita el la parlamento."

Ne temas, trovinte lin providenca estaĵo, igi lin porti la krucon al la kalvario k fari lin ĉiaman martiron de afero kvankam kriminala. Nia "koruptanto" ne povas pretendi esti la nura, kiu financas la ribelon ekde la komenco k eĉ antaŭe.

Estus infanece devii tiel la problemon. Ĉu March ne estas ja la faktoro, kiu fluigas al la batalorganismoj la bezonan monon por la fordetruado de la ioma libero, kiun ĝuas la hispana popolanaro.

March estas la favoranto de la internaciaj financuloj, kiuj por pli bone kaŝi sian politikon, utiligas lin kiel komandanton. Post tiu financulo troviĝas la alt a financaro internacia! Ni senmaskigu ĝin!

Por enabismigi poste la hispanan demokration, kiu ne donis sufiĉan garantion por stariĝo de kapitalisma reĝimo March k la Bankoj, kiuj kontrolas **Rio Tinton**, la minejojn de Asturio ktp. fariĝis komandantoj al la ornizaĵo, kiu devis kontraŭstari la batalon komencotan de la maldekstrularo cele estigi iujn reformojn sociajn en Hispanio.

March disverŝas sian oron inter la financuloj, inokulante al ili konspiri en la registaraj kadroj antaŭ respondeca komisiono post sia ekskomuniko el la Parlamento, March ne restis senaktiva k fariĝis griza eminentulo inter la registaroj, kiuj forsvenis ĝis Marto 1930.

Cele konservi sian potencon March financis la dekstrularon k dank al la internacia nemezurebla forto li atingis superregi la Parlamenton. Iun tagon tamen li devis rifuĝi al Francio.

Fotografaĵo prezentas lin promenanta tra Parizo kun la trankvilo de paca urbano. Tiel marŝas la aferoj. Sed ĉu ĉiam okazas la samo?

G. Joly skribis en "L'Oeuvre" de la 27 de Julio 1936: "La militista ribelo, tiel zorgeme preparita, estas afero lia: liaj agentoj estis, kiuj okupis sin pri armiloj k municioj, kiujn ili transportigis de la havenoj de la Portugala landlimo al la legionoj de Navarra, Leon, Ekstremadura k Sevilja, kiuj nur atendis, jam mobilizitaj, la signalon pri la ribelo por okazigi la militon. Lia feudo de Balearoj, de Maljorka, lia feudo de Afriko, Ceuta estis la bazoj de la ribelo."

La sama instaliĝis en Biaritz iom antaŭe la ribelo k iris kien lia baptinto Gil Robles al li indikis. March estis en konstantaj interrilatoj kun Londono, Lisboa, Palmoj k Meljila. En Julio 1936 la bankiero, asociiĝinta al la jezuitoj, al la karlistoj k al la generaloj, forludis sian lastan karton.

Alia figuro el la financulara mondo donas egale sian kunlaboradon al la organizo de la servutuloj, transdonante sian meman landon al internacia rabado: Kambo.

"Solidaridad Obrera" de la 7 de Februaro de 1937, parolante pri la precedencoj de la Hispana dramo, rivelas la politikobankajn manovrojn de la financulo Kambo, unu el la plej rabemaj friponoj el Katalunio:

"Eksministro pri la Financaro, cinika politikisto, tiu reprezentanto de la plutokrata internacio, havas la senhonton paroli pri prostituita justo, li kiu salajrigis Martinez Anid-ojn k ilies bandojn, li kiu pagis armeon da murdistoj por liberiĝi el la batalantoj de C.N.T. k F.A.I.

"Tiaj estas la homoj, March k Kambo, kiuj hodiaŭ proklamiĝas en la nomo de la adultita patriotismo kiel veraj hispanoj. Neniu ignoras kion kaŝas ilies sincereco.

"La rilatoj de la plutokratanaro k de ties agentoj surprizas la malpli impreseblajn, sed en neniu lando oni atingis al la situacio kreata en Hispanio ekde kelkaj jaroj. Kombinaĵoj de politikistoj k financuloj akcentis la nefirmecon de la stablo, sur kiu oni pretendis starigi la farson estri. Manovro de Kambo, provo pliintensigi la nekvietigeblan batalon kun Santiago Alba, frakasigis la tre povhavan registaron nacian k perforto de Jarnac finiĝis la registaron prezidítan de Alendesalazar en Aŭgusto 1921.

"La 13an de Aŭgusto formiĝis kabinedo de Maura kun Cierva pri la militministerio k Kambo, pri la Financaro, La novaj registaranoj kun la escepto de Kambo, kiu vojaĝis por remeti sur sin la eksceson de la labor. rezultigita pro la fondo de CHADE, inaŭgurita en Junio 1920.

"Evidente Kambo, la superfinanculo, kiu fondis CHA-

# KRONIKO

La Sindikato pri la Fabrika k Teksa Industrio de Alcoy (Alkoj) apartenanta al C. N. T., donacis al la Ministerio de la Instruado 2.300.000 p-tojn. Okaze de tio la jurnalo "Frente Rojo" ("Ruĝa Fronto"), organo de la komunista partio skribas:

"La laboristaj organizoj konas intime la laboron de la Ministerio de la Publika Instruado en ĝia kultura aspekto, speciale kio temas pri la laboristaj Institutoj. Ekde ĝies fondiĝo la Laboristaj Institutoj malfermis la pordojn de la kulturo k progreso al miloj da junaj laboristoj, kiuj integras la vicojn de U. G. T. k C. N. T. Miloj da inteligentaj laboristoj, posedantoj de supera kapablo, kiun antaŭrevolucie ili ne povis patenti nek profiti, hodiaŭ ili prepariĝas, dank' al la justa laboro de la Ministerio pri la Instruado, por inĝenieroj, instruistoj, kuracistoj, arkitektoj, ktp.

Tiu sinteno de la Sindikato de Alcoy devas esti ekzemplo por ĉiuj laboristaj sindikatoj en la popola Hispanio."

* * *

La 2an de Januaro kunvenis en Valencio la Plenum-Komitato de U. G. T. sub la prezido de León Jouhaux, ĝenerala sekretario de C. G. T., kiu estis invitita por arbitri rilate al la skismo estiĝita lasttempe flanke de la Komunista Partio. Jen kion i.a. li diris ĉe la komenciĝo de la kunveno:

"Mi volas unuavice saluti en la nomo F. S. I. manifestante al vi, ke kiel vi konforme konas, la misio, kiu ĉi tie nin venigas estas serĉi la bazojn, kiuj ebligas rekonstrui la sindikatan unuecon de la hispania proletaro. Ŝajnas, devas esti facile atingi kion ni pretendas, priatentante la situacion, kiun travivas la respublikana Hispanio. Malfacile aŭ facile, necesas atingi solvon, ĉar ja la aktuala situacio ne estas plilongigebla tiel en nia intereso kiel en tiu de la internacia proletaro. Via afero estas la nia, via frakaso estos la nia. Pro tio necesas, ke hodiaŭ ni atingu sukcese realigi la reunuiĝon."

Dank' al la prudenta arbitrado de Jouhaux la interfrotado en la vicoj de U. G. T. estis ĉesigita atingite la reunuiĝo.

* * *

La 6an de Januaro kunvenis la Nacia Komitato de C. N. T. Oni legis k aprobis la informon, kiun prezentis k-do Orero de la Regiona Plenum-Komitato de la Federacio de la Industrio pri Akvo, Gaso, Elektro k Hejtajoj de Katalunio.

Oni delegis k-dinon Federica Montseny por ĉeesti, en reprezento de la Nacia Komitato, la feston "La Semajno de la Infano" en la Domo de la Bel-Artoj.

Oni legis komunikon de Loka Federacio de Unikaj Sindikatoj de Torrevieja, kiu diras: "La Loka Federacio petas, ke vi laboru senlace ĝis konstituiĝos la Nacia Komitato de la Antifaŝista Popola Fronto, por ke estu reprezentataj en ĝi ĉiuj antifaŝistaj fortoj de la lando." Oni decidis respondi en la senco, ke C. N. T. realigis ĉiujn fortojn imageblajn por iri al la formado de la Antifaŝista Popola Fronto kun korespondа respondeco al la aliaj partioj k organizoj, kiun ne povis atingi al praktiko, kvankam estis bezono sentata profunde de C. N. T. k sopirata de la popolanaro.

Oni destinas la k-dojn Márquez k Cardona por ĉeesti la kunvenon de la Regiona Plenum-Komitato de la Katalunaj Kamparanoj, kiu okazos la 8an de Januaro.

* * *

La 10.000 parizaj antifaŝistoj, kunvenintaj laŭ iniciativo de S. I. A. en la salono de Gimnasio Japy, kliniĝas antaŭ la valoro k la spirito de oferemo de la hispaniaj antifaŝistoj. Ili promesas labori vigle, por ke laborista Hispanio ricevu de Francio ĉian apogon moralan k materialan, antaŭ ĉio materialan, kian ĝi estas atendanta.

Direktante sin aparte al la du grandaj laboristaj organizoj C. N. T. k U. G. T. la ĉeestintoj al la mitingo esprimas sian fervoran deziron, ke la sindikatara unueco estu baldaŭ fakto por venki plej baldaŭ Franko-n k por ke la hispaniaj laboristoj ĝuu la frukton de sia venko.

La 10.000 k-doj kunvenintaj en Japy, konsideras sia la devon postuli, ke la karceroj de Madrido, Valencio k Barcelono ne plu "gastigu" antifaŝistojn, ili konsideras egale necese k atendas, ke de hodiaŭ, ke ĉiuj antifaŝistaj frapoj estos rezervataj por Franko k lies murdistoj.

Ili disiĝis kun vivuoj al S. I. A. k for la faŝismon kiu invadas Hispanion k perturbas la mondon.

* * *

La korespondanto de "Manchester Guuardian", donante detalan raporton pri la barcelona vivo, skribas i.a.:

"Preskaŭ ĉiuj grandaj vendejoj estas kolektivigitaj k direktataj de la Sindikatoj. Ties posedintoj estas "ĉe la alia flanko". Anarkisto plendis, ke la registaro de Negrín reproprigis multajn vendejojn al la posedintoj, eĉ al tiuj, kiuj regresis el la faŝista Hispanio."

* * *

La jurnalo "Avanti" en sia lasta numero skribas: "Internacia komisiono, laŭ iniciativo de la Internacia Buro de la revoluciaj socialistaj partioj k de la kartelo pri la de-

---

DE-n prezidata de Komiljas, administranto de la Barcelona Banko dum ĝies bankroto, malgraŭ la ampleksa ricevo de pakajo da akcioj, li estis sendecidema akcepti la proponon pri la financministerio. Li iris al Hamburgo k Bruselo por peti konsilon al Heinemann, kiu diris al li akcepti. Ĉiam sentema, kiam temas pri mono, li revenis al Madrido por provi doni konfidon al la burĝoj kandidatoj pri la akcioj de CHADE.

"La 23an de Junio la kabinedo ratifikis sian konfidon al Martinez Anido, estranto de Barcelono, kiu uzus radikalajn mezurojn por silentigi la akciulojn ruinigitajn pro la bankroto de Bankoj de Barcelono, Tarrasa k Madrid. Kambó do devis okupigi la Hispanan Bankon, kies privilegion pri moneldono li akris la 31an de Decembro.

"La Hispana Banko posedis 71 filiojn. En 1931, sub Prieto, oni interkonsentis pri la eldono de 6 milionoj pesetoj.

"Sed ni revenu al 1921, la leĝo pri la banka ordigo proponita de Kambo al la germana financulo Heinemann, konsistigis neimageblan premmanieron en la ekonomia vivo. "Ne estas akcepteble, diras Kambo, ke la Hispana Banko k la privata banko laboros malsame." K delikate li atingis proponi, ke la Hispana Banko ne povas diskonti iun efekton, nek efektivigi iun operacion sen "tria banka firmo" cele neniu privatulo povu trakti kun la Hispana Banko sen trapasi la privatan bankon. K dum en la Parlamento Kambo fariĝis la apostolo de "la plej granda Hispanio", lia subestro Ventoza intrigis en la Ligo de la Nacioj favore al la malplimulto k al la katalunа popolo, ĉi ĉio por realigi sian partion "La Lliga".

"Funde, la propono de Kambo tendencis uzi senpage la monaron de la Hispana Banko por flosigi ĉiujn bankojn, en kiujn intervenis k kiuj troviĝis en malfacila situacio. Li ofertis ĉian ŝancon interŝanĝe pri jurformuloj k neimageblaj kombinoj, sed unika celo lia estis elimini tuj la Hispanan Bankon kiel konkuranton.

"K efektive tri konsilantaroj de la privata banko estas intervenataj de la Konsilantaro de la Hispana Banko. K la privata banko, hontinde, ĉiam rifuzis inspektadon en la nomo de la profesia sekreto."

Sed March k Kambo ne ludas siajn kartojn lastajn: estas aliaj kartoj k aliaj ludantoj.

Trad.: KARMEN

**NIAJ ABONANTOJ POVAS PAGI SIAN LAŬVOLAN ABONKOTIZON AL LA JENAJ NIAJ PERANTOJ:**

| | | |
|---|---|---|
| **K-dino A. BOIS**<br>á MECÉ par VITRE<br>(ILLE-et-VILAINE) FRANCIO | **K-do Adr. PERSSON**<br>STADSHAGEN 13 - A<br>STOKHOLMO, SVEDIO | **K-do T. C. KLIJN**<br>DAPPERSTR 123 - huis<br>AMSTERDAMO, NEDERLANDO |
| **K-do T. ALTWORTH**<br>42 HILSIDE TERRACE<br>BEDWAS, MON ANGLIO | **SAT**<br>av GAMMBETTA 67<br>Parizo 20, FRANCIO | **SENNACIECA KORESPOND-GRUPO**<br>DRAAISTEG II<br>ROTERDAMO |

Sendo de mono rekte al ni ne estas preferinda, krome por la hispaniaj k-doj, kiuj povas kotizi al ni rekte per poshta ghiro. Adreso por ni: INFORMA BULTENO, av. Durruti 30, Barcelono, Hispanio

## Deponejo "INFORMA BULTENO"

| | | |
|---|---|---|
| H. Berg, Hoorn | 1 | guld. |
| J. Cazellar, Figeras | 1'50 | pesetoj |
| K-dino, Lotissemen, Mon Reve | 10 | fr.fr. |
| R. Sanquer, Nantes | 7 | fr.fr. |
| Francis Gue, Les Haies | 5 | fr.fr. |
| Rocquet André, Somain | 10 | fr.fr. |
| K-do Siesen, Roterdamo | 0'50 | guld. |
| M. Raposo, el Portugalio | 1 | guld. |
| K-dino W. Cederhout, Roterdamo | 1 | guld. |
| De disvendita ekzempleroj en Amsterdamo | 1'69 | guld. |
| Constantino Feniz, Pina de Ebro | 75 | pesetoj |
| La Sindikato de Uddevalla | 10 | sv.kr. |
| La Sindikato de Skogshall | 4 | sv.kr. |
| La Sindikato de Karlstad | 8 | sv.kr. |
| La Sindikato de Nora | 2 | sv.kr. |
| La Sindikato de Hjelmedal | 2 | sv.kr. |
| La TLES-grupo de Gotemborgo | 10 | sv.kr. |
| La Junsocialista Klubo de Malmo | 10 | sv.kr. |
| Hartvig Johansson, Gotemborgo | 10 | sv.kr. |
| John Karlsson, Nykôping | 3 | sv.kr. |
| S. U. K., Forserum | 4'50 | sv.kr. |
| E. Persson, Avesta | 1'05 | sv.kr. |
| Gajno de loterio (Durruti-Bildo) Stokholmo | 22 | sv.kr. |
| B. Schuir, Amsterdamo | 0'25 | guld. |

Al ĉiuj ni esprimas sinceran antifaŝistan dankon!

fendo de la revoluciuloj enkarcerigitaj en Hispanio iris al Barcelono por ekzameni la juran situacion, en kiu troviĝas la enkarcerigitoj, viktimoj de la demokrato-burĝa reakcio. Ĝi havis kontakton kun la registaranoj, de kiuj obtenis certigojn super la savo de la enkarcerigitoj k la permeson viziti ilin. En nur unu karceron la komisiono ne povis enpaŝi: en tiun de Ĉeka malgraŭ la registara permeso. La Stalinaj gvardianoj respondis, ke tie "ili komandas".

Esence la registaro komprenigis, ke oni pristudas la kielon doni ĝeneralan amnistion, inkluzive al la "aŭtentaj spionoj de Franko".

Sed tio ne trovos grundon... la k-doj de POUM k la enkarcerigitaj liberecanoj kalumniataj malnoble pri servo al la faŝistoj repuŝas k denuncas samtempe al la publika opinio la manovron pri amnistio. Per ĝi oni celas kontentigi la lupon k la ŝafidon..

La revolucia proletaro el la tuta mondo petas nur unu aferon al la respublika registaro; justecon. Ĝi ne petas "piecon", ĝi volas scii ĉu efektive estas mizeraĉaj perfiduloj por puni aŭ malestimindaj kalumniantoj por ŝenmaskigi ilin. Nur tiel oni devas starigi la demandon."

## INFORMEJO

K-do Gugon Jeljavski deziras korespondi kun k-d(in)oj pri diversaj temoj el la vivo k batoloj de laboristoj el diversaj landoj. Ankaŭ pri junulaj temoj. Respondo garantiata. Adreso: str. Strodnja, 58, Sofio, Bulgario.

* * *

Oni petas ekscion pri k-do Age Kjesô (Vimmer) dana k-do, kiu malaperis en Barcelono post partopreno ĉe la frontoj de Madrido, Andujar k Hueska. Skribu al: Tage Laŭ, Kjeldgardsvej 33, Kopenhago, Danio.

## LETERUJO

*A. Smith, Amsterdamo.* Dankon pri la res. kup.!

*Amalie Fleischhansova, Veselin. Luz.* Kun emocio ni legis vian leteron kortuŝan. Sed bedaŭrinde ni konas neniun kunanon ĉefrontan de la pereinta k-do. Ĉiuokaze pere de liaj Barcelonaj konitoj ni klopodos kontaktigi nin kun iu k ĉe pozitiva rezulto ni komunikos al vi senprokraste. — Dankon pri la res. kup!

*G. v. de Werdt, Amsterdamo.* Ni esploras.

*H. Awitte, Amsterdamo.* Dankon pri la res. kup.

*J. Liedermooy, Amsterdamo.* Varmkore ni akceptas viajn novjarajn gratulojn k bondezirojn. Kvereloj k interfrotadoj, k-do, estas karakterizeblaj ĉe ĉiu heterogena bloko. Kompreneble eklektiko eblas.

*Fred. Schrôder, Stokholmo.* Ni transdonis al M. la senditan. Ofte vizitas nin. La bulteno regule sendata.

*Fratoj Rasenberg, Roterdamo.* Varmkoran dankon pri la novjara gratulo !

*Ricardo Quiles, Ejército del Centro.* Malkovri la manovrojn de iuj elementoj ne signifas "daŭrigi la interbatalojn antaŭ la internacia laboristaro". Nia plenvolo al agad-unueco estas tre facile ekvidebla, tamen oni devas objektive juĝi por konstati tiun fakton.

## LASTHORE

K-doj, ne kulpigu, ni petas, nin pro prikorespondenca neakuratemo, se vi hazarde ne ricevas respondon senprokrastan post peto farita de vi al nia redakcio aŭ administracio. Plejofte la kaŭzoj estas ekstere de ni. La fervojcirkulado ne ĉiam regulas pro la "cirkonstancoj". K krome estas alia kaŭzo multe pli atentinda k konsiderinda. Ĉe la cenzurejo oficas "samideano", kiu laŭvole retenas la poŝtaĵojn adresitajn al nia bulteno por ilin "pli bone k atente trarigardi" (cenzuri), ĉar ja, laŭ lia deklaro, Informa Bulteno informas aljel.

El patologia vidpunkto ni senkulpigas lin pro lia trofideleco al sia organizo (P.S.U.C.), sed ni ne scias, k-doj, ĉu vi senkulpigos lin, se vi, post peto fatita de vi al ni, ricevas respondon post 1-2 monatoj.